# VERDA PAĜO

**FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ PRI ESPERANTO**

*Tiu ĉi rubriko servas niajn novulojn. Oni ofte metas al ni demandojn, kiujn – pro manko de sufiĉaj spertoj – estas malfacile respondi, konvinke rebati. Ĉi tie ni deziras liveri utilajn faktojn kaj argumentojn.*

## Demokratio kaj mult-lingveco

***Sci-volulo**:* Saluton, kara ĉef-komputila Moŝto! Ĉu mi ĝenas vin?

***Ĉef-komputila moŝto**:* Saluton, Sci-volulo! Tute male. Mi delonge atendas vian vokon. Ĉu mi povas vin helpi? Parolu!

***S**:* Kun ĝojo. Ĉu vi aŭdis, ke ankaŭ nia lando baldaŭ aliĝos al Eŭropa Unio (EU) kaj solviĝos por ĉiam nia izoliteco. Mi tre ĝojas.

***Ĉ**:* Gratulon! Ĉu ankaŭ la lingva izoliteco?

***S**:* Jes ja, ĉar ĉiuj lingvoj estas egalrajtaj. Tio estas postulo de demokratio, ĉu ne?

***Ĉ**:* Sendube. Kaj kiel realiĝas la demokratia principo de komunikado en EU? En kiu lingvo vi, ekzemple, parolos kun estono? Ĉu en la estona aŭ en la hungara?

***S**:* Ili ambaŭ estos oficialaj lingvoj de EU, tamen praktike, tre verŝajne, ni komunikiĝos en iu labor-lingvo de EU, ĉu en la angla, franca…

***Ĉ**:* Se ekzistas distingo inter la lingvoj, t.e. ekzistas, unu-flanke, oficialaj lingvoj, aliflanke, laborlingvoj, tiu-okaze ne ekzistas vera egaleco en la komunikado.

***S**:* Vi pravas. Tamen, tio estas pli bona ol se estus nur unu deviga lingvo por ĉiuj.

***Ĉ**:* Sendube. Kaj vi pravas en tiu okazo, se la deviga lingvo estus iu el la lingvoj de la aliĝintaj nacioj. Sed kiel paroli pri demokratio ĉe tia okazo?

***S:*** Ni devus, do, laŭ via opinio, elekti iun ekster-Eŭropan lingvon por preferi neniun nacion.

***Ĉ**:* Tio estus stultaĵo. Ekzistas, ja – de pli ol 100 jaroj – neŭtrala internacia lingvo, kiu baziĝas sur la hind-Eŭropaj lingvoj, kaj kiu – pro sia reguleco – estas multe pli facila ol iu ajn el la naciaj lingvoj. Prudenta homo, memkompreneble, elektus tiun elirvojon, se li vere deziras demokration.

***S:*** Pri tio mi absolute konsentas, eĉ plen-kore apogas ties realigon laŭ miaj modestaj forto kaj kapablo.

***Ĉ**:* Mi deziras al vi kaj al viaj amikoj, baldaŭan triumfon en la komunikada kampo.

***Venis jam la tempo de demokratio ankaŭ en la komunikado transnacia***

*estono:* popolo apud la Balta Maro / *principo:* fundamenta veraĵo / *stulta:* malsaĝa / *triumfo:* brila venko, sukceso.